„Mutig vorwärts!" „Kuraĝe antaŭen!"

Aŭstria Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Asocio

6a jaro. No. 5 Monata Majo 1929

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. Ŝ 4.80, germanlandanoj RM 3.25 alilandanoj sv. fr. 4.25, ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Dr. Viktor Matejka

spricht am 24. Mai um halb 8 Uhr abends im I. Wiener Esperanto-Klub, I. Annagasse 5 („Politische Gesellschaft") über

„Kriegsmöglichkeiten der Zukunft" und

Viktor Hawlik

Min.-Rat im Bundesministerium für Handel und Verkehr

am 7. Juni um halb 8 Uhr, I. Annagasse 5 über

„Der ideale Staat"

in deutscher Sprache. Einleitende Worte in Esp. Gäste willkommen. Eintritt frei.

*

Die **Volkshochschule in Wiesbaden** hat in ihrem Frühjahrslehrgang 1929 vier Kurse für Esperanto eingerichtet. Wir wollen hoffen, daß auch die Urania in Wien bald einen oder mehrere solche Kurse einrichten wird.

Von **E. I. A. R. Radio Genova** (Via S. Luca 4) sprach am 20. April Jean Borel in Esperanto über „Fortschritte der Landwirtschaft in Italien."

Ein katholisches Esperanto-Reisebüro wurde in Rom, Viale Regina Margherita 85c unter der Leitung von Rag. Blasimme Ascenzio gegründet. Es besorgt Wohnung, Essen, Führungen. Für jeden Romfahrer empfehlenswert. (Espero Katolika)

Der **3. Kongreß des intern. Jugendbundes** (Ligue Intern. de la Jeunesse), Sitz Frankreich, hat seinen Landesabteilungen empfohlen, die Verbreitung und den Unterricht in ihren Ländern zu fördern, und seinen Mitgliedern, E. zu lernen.

Esperanto-Gottesdienst

Unterkirche Alt-Ottakring

Sonntag, 26. Mai, 3 Uhr nachmittags

Minoritenkirche

Sonntag' 16. Juni, 10 Uhr mit Predigt

Liverpool: Davis Lewis Club veranstaltete Esp.-Kurse für Jungmänner.

Die Welt am Morgen.

Diese, wie das Titelblatt besagt „Von 80.000 Oesterreichern gegründete Tageszeitung zum Kampfe für Wahrheit und Gerechtigkeit", brachte in einigen Folgen Artikel über Esperanto und begann in ihrer Sonntagsnummer vom 28. April einen Esperantokurs, der von Dr. Emil Pfeffer geleitet wird. Die Welt am Morgen ist nun die dritte Wiener Zeitung, die Esperantokurse regelmäßig am Sonntag bringt.

Wir empfehlen unseren Lesern, Lernbegierige auch auf diesen Esperantolehrgang aufmerksam zumachen.

Internacia Esperanto-Muzeo.

Protektoro:

Prezidanto de la Respubliko Aŭstrio, Wilhelm Miklas.

Leteradreso: Wien, I. Annagasse 5.

Internacia Honora Komitato:

Afable eniris:

Profesoro d-ro Anton Rintelen, eksministro, landestro de Stirio, en Graz.

D-ro Edmond Privat, honora prezidanto de ICK, en Territet, Svislando, kiu skribis:

Karaj samideanoj

Pro mia malbona ŝano mi bedaŭrinde povos nek veturi al kongreso, nek akcepti vian afablan inviton (paroli) . . . . sed mi volonte jesas vian peton, ke mi eniru en la honoran komitaton.

Mi kore esperas, ke viaj laboroj por la Muzeo kaj por la Antaŭkongreso bone sukcesos kaj mi sendas al vi mian amikan saluton kaj bondeziron

Edmond Privat.

Ni tre ĝojas pri la akcepto de nia eminenta d-ro Privat, sed ege bedaŭras, ke ĉe tiu ĉi soleno la honora prezidanto de ICK, kiu ne mankis depost la Kongreso en Ĝenevo (1906) ĉe iu pli granda afero en la E.-movado, pro sia malbona sanstato ne povas ĉeesti. Ni esperu, baldaŭan tutan resaniĝon.

Internacia Kuratora Komito.

W. E. Collinson, profesoro de germana lingvo kaj honorofica docento de lingvoscienco en la Universitato de Liverpool sendis jenan leteron:

New York, 5. 4. 1929.

Altestimata sinjoro Steiner!

Kun plezuro mi akceptas la honorindan inviton eniri la Intern. Kuratoran Komitaton de Intern. E.-Muzeo en Wien . . . .

. . . . . Mi akceptas des pli volonte, ĉar mi multe ŝatas Aŭstrujon kaj ĝiajn enloĝantojn.

Kun bondeziro Via samideano

W. E. Collinson.

Donacoj:

Nia tre favora samideano generalo Rambousek en Česke Budejovice, kiu jam sendis ofte materialon kaj monon, denove grandstile donacis al IEMW. Kiel Heroldo de Esperanto sciigis nin, la generalo sendis al li Rm. 50.—, por kiu sumo IEMW povas elekti librojn, kiujn ĝi ne ankoraŭ posedas. En konata modesta maniero nia samideano nenion skribis al ni pri tiu donaco. Sed ni sentas la devon, danki lian moŝton per tio publike.

Materialo ricevita:

Laŭ donaclistoj n-ro 173. Litova E.-Asocio-Kaŭnas, 174. E.-soc. »Laboro«-Lodz, 175. Asociazione Torinese-Torino, 176. k. 179. H. Sentis-Grenoble, 177. E.-Klubo-Kolin, 178. J. Glück-Berlin, 180. Dir. Struska-Wien, 181. Bureau Int. d'Education-Genève, 182. Bulgara E.-Asocio-Ruse, 183. J. Vathkerl-Thallinn, 184. Joh. May-Sulzbach Saar, 185. Finnlanda E.-Asocio-Helsinki, 186. Fred A. Hamann-Wauwatosa, USA, 187. Generalo Jan Rambousek-Česke Budejovice, 188. Komitato de St. Venceslao-Praha: 189. F. H. Hambury-London, 190. ILEPTO (prez. d-ro Spielmann)-Bern, 191. Dim. Sem. Snejko-Minsk, USSR, 192. Fernando Zacche-Mantova, 193. F. J. Schade-Wien (ni nur nun finis la longan liston de la antaŭ pli longa tempo donacitaj libroj).

Mono alveninta:

Inĝ. A. Gueritte-Surbiton, Anglujo, sendis angl. ŝ. 6.—.

Sendu ĉiu materialon, helpu per tio, por ke ni povu montri okaze de la malfermo jam grandan aron da libroj ktp.

Ni petas pardonon, se ni nur nun povas respondi aron da leteroj, ĉar la preparoj al Antaŭkongreso faras multan laboron. Speciale tio koncernas niajn italajn amikojn: Facchi, Orengo k. a. De nun tuja respondo!

Por aŭstrianoj:

Ni volonte sendos al viaj korespondantoj alilandaj la belegan prospekton de la ministerio por komerco »Aŭstrio«, se vi sendos la necesajn kovertojn en ĝusta grandeco kun skribita adreso de via korespondanto kaj afrankite per 8 gr. Ni garantias tujan forsendon!

Por Loka Kuratora Komitato:
Steiner, prez.

„Antaŭkongreso al la XXI-a" kun „Malfermo de Intern. Esperanto-Muzeo en Wien".

Wien, 30. julio—2. aŭgusto 1929.

Leteradreso: Wien, I. Annagasse 5.

Protektoro:

Prezidanto de la Respubliko Aŭstrio
Wilhelm Miklas.

Programo:

30. julio posttagmeze kunvenos la jam alvenintaj gastoj en Kafejo Konstantinhügel en Prater, kie ili en bona aero meze en Prater trinkos bonan kafon.

31. julio dum la gvidado tra malnova Wien ni vizitos — laŭvole — la iamajn imperiestrajn salonegojn en Hofburg (rabatita je 50 gr.) kaj imperiestran trezorejon (sama prezo) kaj Kapuzinergruft kun la ĉerkoj de iamaj imperiestroj (senpage).

Kongresejo: La 30. kaj 31. julio Wien, I. Annagasse 5, I. et. (Politische Gesellschaft, telef. n-ro R 26-406) kaj la 30. julio posttagmeze ankaŭ en Kafejo Konstantinhügel (Prater, tel. R 43-4-37).

Kongreskartoj aldonataj al ĉi tiu numero por tiuj, kiuj ne ankoraŭ ĝin ricevis.

Membrokartoj al IEMW aldonataj al ĉiuj ĝis nun al Antaŭkongreso aliĝintoj.

Mendu **»Antaŭpagitan biletaron«** plej baldaŭ. (Vidu nian gazeton n-ro 4).

Ni aldonas: Tagmanĝo sur ŝipo al Budapest, se 100 personoj aliĝos, tre rabatita menuo kun trinkmono Ŝ 3.50.

Karavanoj Mosse: Tri estas anoncitaj, kiuj eliros el Berlin kaj Köln. Detalojn legu en Germana Esperantisto. Ĉefgvidanto estos s-ano Ellersieck.

Karavano de UEA: Informojn en »Esperanto«-Ĝenevo.

Karavano Onnen: Informojn donos inĝ. M. F. Onnen, Hago, Groothertoginnelaan 97.

Post XXI-a la samideanoj havos okazon vojaĝi en Aŭstrio kaj viziti niajn belajn urbojn kaj regionojn. La samideanoj en la diversaj lokoj, precipe en Graz, Linz, Innsbruck, Salzburg ktp. jam verkis programon, por montri al vi la plej belajn vidindaĵojn kaj prepari vian restadon. Detalojn ni publikigos en la venonta numero.

Pro informo: Karavanoj, kiuj jam ĝuas rabaton, ne ricevos pluan rabaton por la karavanoj por ĉi tiu vojaĝo, ĉar oni ne povas doni al ili dufoje rabaton. Sed por la membroj valoras la rabato certe por la reveturado unuopa. Pro tio ĉiu partoprenanto stampigu sian Antaŭkongreskarton enirante Aŭstrion en la limstacio.

Aŭstrianoj devas uzi, por ĝui 25% rabaton, tien kaj reen la fervojon kaj pagi 1½ biletojn al Wien (AE n-ro 3).

Festludoj en Salzburg: Ĉiu kongresano ricevos en Wien prospekton pri la festludoj, kiuj okazos post XXI-a.

Gvidfolio de Linz ĵus aperis Ni esperas, ke ni povos doni tian al ĉiu kongresano.

Ŝipveturado de Wien al Budapest daŭras de la 8. mat. ĝis la 8 vespere.

Aliĝis ĝis nun:

96. Kaes Hedwig, librotenistino, Wien
97. Pirkst Milda, maŝinskribistino, Riga
98. Ondryas Anny, Wien
99. Adam Maria, Graz
100. Uttilinger Karl, Wien
101. Privat d-ro Edmond, Genève
102. Privat, s-ino Genève
103. Kreuz Robert, ĝen. sekr. de I.CK., Genève
104. Jakob-Notz Hans, dir. de UEA., Genève
105. Sarnes Gertrude, Breslau
106. Maultz Mania, Frysztat, ĈSR.
107. Maultz Karol, kateĥisto, Karwina, ĈSk.
108. Couffinhal Prosper, Relizane, Alĝerio, Afr.
109. Kovacs Theodor, ferv. ĉefofic., Rakosszentmihály, Hungarujo
110. Macfarlane Agnes G., Glasgow, Skotlando
111. Kennedy Meg, instr.-ino, Glasgow
112. Mc Kenzie Milly, instr.-ino, Glasgow
113. Kennedy David, instr., Glasgow
114. Juŝen Ŝarlote-Otilija, instr.-ino, Riga
115. Gueritte A. Tony J., inĝ., Surbiton, Angl.
116. Mayrleb Hermine, Wien
117. Mayrleb Karola, instr-ino, Wien
118. Bick d-ro Josef, ĝen.-dir. de Nationalbibliothek, Wien
119. Uebelhör d-ro Franz, sekcia ĉefo, Wien
120. Cart Theophile, prof., prez. de Lingva Komitato kaj Akademio, Paris
121. Krauskopf Martin, Wien
122. Sinner Oskar, oficisto, Wien
123. Beck Otto, ĉefinstr., Augsburg
124. Kirchner F. Aeg., prof., Lienz, Tirolo
125. Nicol Alison A., Glasgow
126. Dougall Annie G., Glasgow
127. Craig Isabella M., Glasgow

Karavanoj de Mosse:

301. Fritzsching Kurt, sekret., Washington, USA
302. Fritzsching Lide, Washington, USA
303. Dauge Emil, Berlin-Steglitz
304. Dauge Julie, Berlin-Steglitz
305. Ellersiek Friedrich, editisto, Berlin

Hovorka, sekr. Steiner, prez.

Innsbruck, ĉefurbo de Tirolo (573m)

Neniu preterlasu viziti post la kongreso ĉi tiun belegan urbon. Neforgesebla restos la impreso, se oni staras sur Maria Theresienstraße kaj vidas la neĝkovritajn montojn en tia proksimeco, ke oni imagas ilin ekkapti.

Innsbruck estas la plej bela urbo en la aŭstriaj alpmontoj, 70.000 enloĝantoj, belega ĉirkaŭaĵo, centro de multaj fervojlinioj.

Kablofervojoj kondukas sur »Patscher-Kofel« (2210 m) kaj »Hafelekar« (2340 m), de kie la vojaĝanto ĝuas belegan perspektivon. Elirpunkto por neforgeseblaj migradoj en la tirolan glaciejmondon kiel »Stubai«, »Oetztal«, »Zillertal« ktp.


Vidindaĵoj: Goldenes Dachl, Hofburg, Hofkirche, Triumpfpforte, Ottoburg, Alter Stadtplatz kun Stadtturm kaj »Katolika Kasino«, reliefo de Tirolo, Isel-monto kun Kaiserjägermuseum, Berg-Isel-Panorama (rondpentraĵo de la batalo sur Berg-Isel, 1809), Ferdinandeum (muzeo), Nova Universitato, Hungerburg.

Pri loĝigo turnu vin al UEA-delegito aŭ al la prez. de E.-Klubo s-ro Kühbacher Roland, Innsbruck-Hötting Bildstraße.

Budapest, la urbo de XXI-a.

Kun granda plezuro oni akceptis la proponon de la hungaraj samideanoj, lokigi XXI-an al Budapest, la ĉefurbo de Hungarujo.

La unuan fojon oni per tiu elekto — Budapest estas geografie bonege situata




Princo Eugen-monumento antaŭ reĝa palaco.

— ebligis al la samideanaro de la orientaj landoj ĉeesti en multnombro nian mondfeston. Por la esp.-istoj el aliaj landoj Budapest ankaŭ estas facile atingebla.

Sed ĉiujn samideanojn — el kiu lando ili estu, ĉu el Azio, Ameriko, Afriko, Aŭstralio aŭ Eŭropo — allogu la bela urbo apud ambaŭ bordoj de Danubo, la belegaj kaj ĉarmaj inoj, la fama gastameco de la hungaroj, kiuj fieras montri al la tutmondo, kion ilia diligenteco kreis en ilia Budapest, allogu la plezuraĵoj, fama ciganmuziko ktp., kiujn havigos al ili la senlaca komitato de XXI-a, allogu la bela ĉirkaŭaĵo. Ankoraŭ multajn allogilojn mi povus nombri al vi! Mi ne faras tion, mi nur elkore invitas vin, veturi — post ĉeesto al Wien-a Antaŭkongreso — komune kun ni al Budapest!

Vi travivos tie neforgeseblajn tagojn kaj horojn kaj ricevos la ĝustan impreson pri Hungarujo kaj ĝia ĉefurbo!

Ĉu mi rakontu al vi pri ĝia historio? ⟨tralegu la eble jam delonge en iu kesto konservitan historilibron lernejan pri la malnova historio, kun la nova vi konatiĝu en Budapest mem⟩ — pri la ekonomia vivo? ⟨vi vidos la diligentecon de la enloĝantoj kaj mem povos fari viajn konkludojn!⟩ — pri la beleco de la urbo? ⟨ĉiu jam certe vidis bildojn kaj povas iomete imagi la belajn Burg, palacojn, publikajn konstruaĵojn kaj la diversajn belajn perspektivojn, sed nur iomete! la realeco superos viajn imagojn!⟩ — pri literatura vivo? ⟨rememoru la nomojn de mortintaj verkistoj Petöfi, Jókai, Arany, Vörösmarty, Madách, Kolomano Mikszáth kaj de nunaj Géza Gárdonyi, Herczeg, Molnár kaj de niaj Baghy, Kaloscay!⟩ — pri pentrista arto? ⟨Munkácsy, Michaelo Zichy, Paŭlo Szinnyei-Merse, Filipo László estas fame konataj.⟩ — pri muzikarto? ⟨multaj grandaj muzikistoj verkis tie!⟩ — pri kolektaĵoj? ⟨Muzeo de belaj artoj, interesega Franc Hopp-muzeo de orienta arto, Nacia Muzeo, Agrikultura Muzeo ktp.⟩ — pri banejoj? ⟨La banejkulturo estas sur alta rango kaj donas al la fremdulo ĉiun komforton kaj agrablecon⟩ — pri ktp. ktp.?



Bastiono »Fiŝkaptisto«

Se mi daŭrigus, mi eble ne povus fini! Pro tio mi ne daŭrigas, sed finas.

Steiner.

Adreso: Esperanto-Kongreso, Budapest.
Tuj aliĝu al XXI-a.
Kotizo al XXI-a Ŝ 35.—
Aliĝilojn mendu ĉe AE.

Deklaracio pri neŭtraleco.

»De kelka tempo malamikoj de Esperanto klopodas por identigi la ĝeneralan propagandon por la internacia helplingvo Esperanto kun la agado de partianoj, kiuj praktike uzas Esperanton por certaj sociaj celadoj.

La Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado en Ĝenevo, elektita de 36 naciaj societoj por la propagando de Esperanto kaj kiu reprezentas proksimume 100.000 Esperantistojn en la tuta mondo, deklaras formale kaj firme, ke ĝia programo, celanta nur la enkondukon de Esperanto, estas absolute neŭtrala rilate aferojn de politiko, religio, raso aŭ socio.

Ĝi insiste kontraŭstaras al tiuj malveraj asertoj, kies efiko signifas nur malhelpi la grandan progreson, rezultantan el la ĝenerala adopto de facile lernebla neŭtrala helplingvo apud la koncerna gepatra lingvo.

INTERNACIA CENTRA KOMITATO DE LA ESPERANTO-MOVADO«

Pedagogia Kongreso en Ĝenevo.

De 26-a de julio—4-a de aŭg. 1929 okazos en Ĝenevo la III. Kongreso de la Mond-Federacio de Edukaj Asocio en kunlaboro kun Internacia Eduka Oficejo.

E. okupos en ĉi tiu aranĝo gravan lokon. D-ro Privat, honora prezid. de ICK. estis invitata fari raporton pri E. kaj reprezentos ICK kaj UEA.

La verko, kiun atendas la tuta esperantistaro!

Plena vortaro de Esperanto.

La mankon de bona kaj sufiĉe kompleta vortaro de nia lingvo jam sentis ĉiu esperantisto, precipe verkistoj!

Por akiri unuecon en la kompreno de la vortoj, veran unuecon kaj interkomprenon, kolektivo da kompetentuloj — profesoro E. Grosjean-Maupin, direktoro de la sekcio »Komuna Vortaro« en Esperanta Akademio, estas la ĉefverkanto — nun diligente laboras finredakti »Plenan Vortaron«.

La volumo (14·5 : 20 cm, 450—500 pĝ.) aperos antaŭ fino de 1929 kaj ĝia prezo por mendoj pagitaj antaŭ la apero de la libro estas Rm. 7. La monon sendu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23. Rue Boyer, Paris-XX. aŭ al R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-O-27.

Intern. Radio-Asocio (IRA).

IRA estis restarigata, invitas al kunlaboro kaj abono de »E.-Radio-Programo«, kiu aperas en 3 eldonoj (plena-, propaganda- kaj semajna-).

Traduku la informojn (aperintajn en »Heroldo« kaj ERP) nacilingven, tute aŭ parte, pro represigo en naciaj gazetoj. Sendu al ni Radio-informojn. Fariĝu ano de IRA.

Vi per tio praktike helpas nian movadon!

Paul Lendorff, int. sekr. de IRA
Overbyes Allé 38, Kopenhago.

St. Venceslao-Festoj,
aranĝataj en 1929.

Komitato por S. Venceslaofestoj, Praha III, Josefská 8 invitas je partopreno kaj donas ĉiujn informojn. Belega kaj grandega afiŝo en Esp. montras, ke la komitato ekkonis la valoron de E. kiel propagandlingvon.

En la kadro de la festoj okazos XIV. Intern. Kongreso de katol. esp.-istoj (11.—15. VIII.). Kontraŭ respondkarto donas Katol. Unuiĝo E.-ista, Wien, I. Freyung 6 ĉiujn informojn ankaŭ pri intencata karavano al Praha.

Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio.

Sub ĉi tiu titolo aperis 16 paĝa broŝureto, entenanta oficialajn raportojn de la prezidanto de Akademio (prof. Th. Cart) kaj de sekciaj prezidantoj por komuna vortaro (E. Grosjean-Maupin), gramatiko (d-ro Walter Lippmann), premioj kaj elparoloj (d-ro Edmond Privat) kaj teknikaj vortaroj (M. Rollet de l' Isle). Ĉi tiu oficiala bulteno estas bonega informilo al ĉiuj literaturistoj, E.-instruantoj kaj perfektiĝemuloj. Ĝi estas ricevebla de Akademio-Paris. Prezo ne indikita.

Esperanto-original-stenografio
de prof. Ewald Brabbée kaj Karl Haager

Ĵus aperis. Mendebla ankaŭ ĉe ni. Prezo kun afranko por Aŭstrio Ŝ 2.50.

A. Th. Sonnleitner.

Dum la amika kunveno okaze de la 60-a naskiĝfesto de Sonnleitner ankaŭ samideano lern.-kons. Raimund Peter-Bisamberg manuskripte transdonis sian tradukon de »Bäcker-Franzl«.

S-ro Peter disponigis al ni jenan tradukon:

Der Vorsatz.

Schwatzkopf, wie die Elstern alle,
Hatt' einst eine alte Elster
Ihren großen Schatz verraten,
Den sie tief im Nest verborgen.
Nächsten Tages stand sie traurig
Vor dem ausgeleerten Neste,
Denn verschwunden war der Ohrring
Und der glitzernd schöne Splitter
Und die goldne Busennadel,
Die sie von der Kinder Spielplatz
Mit Gefahr herbeigetragen.

Und ihr Plaudern tief bedauernd,
Faßte sie den festen Vorsatz,
Nun ihr Schwatzen ganz zu lassen.
Und durchdrungen von dem Vorsatz
Flog sie durch die grünen Tannen,
Um dem Walde zu erzählen,
Was sie sich nun vorgenommen.

Aus »Von Schönheits Gnaden.«

La intenco.

Babilema kiel pigoj,
Estis iam pig' maljuna
Malkaŝinta sian grandan
La trezoron en la nesto.
Postan tagon ĝi malgaje
Staris antaŭ nest' malplena,
Ĉar la brila orelringo
Kaj la briletanta splito,
La belega ora broĉo, —
Iam de l' infanludejo
Kun danĝero alportitaj,
Ĉio estis perdiĝinta. —
Pri la babilad' pentante,
Plej decide ĝi intencis
Nun neniam plu babili.
Penetrita de l' intenco
Flugis ĝi tra l' abiaro,
Por rakonti ĉie, kion
Ĝi nun estas intencinta.

El »Per graco de l' beleco.«

Pri la spirito de la lingvo.

El parolado en Unua Esperanto-Unuiĝo de d-ro Kurt Frieberger.

Ĉu artefarita interkomprenilo povas por unuopa homo atingi la valoron de natura lingvo? Ĝuste la aŭstriano devas ege deziri la jesadon de ĉi tiu demando, ĉar lia malnova patrolando frakasiĝis pro reciproka sinnekompreno de l' popoloj. Kiel terure, kiel mortige povas efiki lingva fremdeco — travivaĵo dum la milito tion revenigas en mian konscion. Ordono: rajdi tuj al la milita tribunalo kaj transpreni la pledadon por rutena vilaĝestro. Estis en printempo 1915-a, en urbeto de ĵus liberigita orienta Galicio. Dum la rusa invado la juĝoto laŭdire estis farinta perfidon kontraŭ la regno kaj ofendon kontraŭ la majesto. Dum la longdaŭra rajdado al la tribunalo ĵetis malserenaj rememoroj malhelajn ombrojn sur mian vojon. Kiom ofte pro ruza perfido estis la rajdanto kun siaj kunuloj tutproksime al morto kaj kaptiteco! Kiom da homoj — ĉu estis pli frue la kulpo pruvita? — li vidis iri al morto per pendigo. Al tio la indigniĝo de militestroj pensantaj, ke ili devas timigi per ekzemploj.

Ekstere, sub arboj estis la tribunalo. Tie sidis la juĝistoj, la aŭditoro, kaj la pledanto — ĉiuj estis germanaj oficiroj. La interpretisto estis militĝendarmo, farinta cetere bonan impreson, sed li estis — polo. Ankaŭ la du ĉefatestantoj estis poloj, malbonfama, forpelita ĝendarmo kaj lia edzino. Kaj nun venis la akuzita kamparano. Viro belegstatura, senĉapela,

nudpieda, en mallonga kruda, kolora tolĉemizo, kun malnova oficirpantalono sur la kruroj. La milita ĝendarmo tradukis la demandojn, tradukis la respondojn. Sed kiam la atestantoj alrigardis la bedaŭrindulon kun prodomaĝĝoja moko, kaj parolis pli kaj pli, kion li ne komprenis, kaj ĉiuj aliaj direktis al li demandojn, kiuj estis mortminacaj, kaj la interpretisto ĉiujn liajn respondojn tradukis mallongigite en lingvon, kiun li ne komprenis, jen subite, pro neeldirebla timego pri la ekzekutisto, li metis du fingrojn de la dekstra mano sur du fingrojn de la maldekstra, kvazaŭ krucon, kiun li nun kisis kaj . . . preĝis . . . preĝis nur plu mallaŭte per tremetantaj lipoj. — Li apenaŭ povis kompreni, ke la pledanto sukcesis, lin savi el milittribunala kondamno.

La kolero, ne esti komprenata, trudis la lingvofieron de negermanoj en malnova Aŭstrio al katastrofpolitiko. Kaj efektive tiu malnova Aŭstrio estis tre milda en sia lingvopolitiko, kompare al nuntempaj potencoj. Jam la normanoj provis venigi ordon en la lingvan ĥaoson de Sicilio, »gens efficiatur ut una«. Ankaŭ al ilia perforto ne sukcesis la eksperimento. Neniu gento volas kaj povas oferi al vivanta lingvo de alia popolo la sian. Ĉar lingvo — matematike dirite — estas funkcio de ĉio tio, kio al ĝi estas kara kaj valora, kiu al ĝi donas animan apogon kaj estas kvazaŭ ĝia historio mito.

Strange: Lingvo en si mem estas homa verko. La sekreto de ĝia estiĝo ne estas solvata. Laŭ skribo de plej antikvaj popoloj, kiuj ellasis la vokalojn, estis verŝajne konsonantoj, kiuj, eble ĉe lunkultoj, estis uzataj laŭ certa sinsekvo, spirtonoj, intencantaj enblovi forton al la vivondonanta, kreskanta astro. El la kruda komplikaĵo de la konsonantoj evoluis fine la floro de la vokaloj, plej bele en la plej tonriĉaj lingvoj.

Sed apenaŭ estis eltrovita la parolo, la bedaŭrinda homo verŝajne tuj sentis timon pro la lingvo. Jen estis nun vortoj, kiuj povis percepti ĉion videblan, ja eĉ nevideblan. La pastroj konis la sekreton de ĝusta elparolo. Kolosan potencon povis akiri, kiu parolis kiel tion ordonis Maa-cheru, la skribisto de l' egiptaj dioj kaj juĝistoj en la ĉielo. Multloke efikis la sorĉo de l' vorto: »Kabbalah« de l' hebreoj, kiel ankaŭ »Mantras« de l' hindoj atestas tion. Sed estas forta ankaŭ la klopodo pri pli distinga lingvo de kulto kaj poezio. Ege suferas la novhelenaj poetoj pro la skismo inter literatura- kaj vulgara lingvoj: »katharevussa« kaj »kathomilumeni«.

Efektive lingvo funkcias ankaŭ kiel korpoformanto.

Tial ankaŭ oni neas, ke la simiece mallongigita mentono de prahistoriaj homoj havas la kapablecon porti muskolojn kaj nervojn, kiajn parolkapabla buŝo bezonas.

La ritmo de la lingvoj influas la popolkarakteron, regas la temperamenton. Komparo de l' varioriĉa pli trokea akcento en la germana kun la jamba-anapesta kadenco de l' franca lingvo evidentigas tion. Kelkaj ĝuste akcentataj vortoj povas havi nekredeblan politikan potencefikon, kiel ekzemple »Nem, nem, soha!« (ne, ne, neniam) de hungaroj, protestantaj kontraŭ la krueloj de ilia packontrakto.

Multe ankoraŭ estus direble. Ke oni povas ekzemple el la lingvo de iu popolo legi ĝian historion, ĝian feliĉon kaj malfeliĉon. La germana lingvo estis post la tridekjara milito same stilmalriĉa, kiel post la jaro 1918-a, en la epoko de l' ekspresionismo.

Tasko de artefarita interkomprenilo, kia estas Esperanto, kiu enhavas nenian miton, devas esti, fariĝi »lingvo« t. e: ĝi devas efikigi per aŭdebla, legebla, parolebla medio la animon de ĉi tiu tempo, la kolektivan animon de siaj plej pacifistaj, kaj homamaj, de l' plej bonvolaj adeptoj. Multaj eblecoj ekzistas. Sed

okaze de malkonstruo de la babela turo, ĉi tiu nova idiomo ne pereigu la kreskinton. Estas memkompreneble, ke la bolŝevismo tiel favoras Esperanton, volas al ĝi havigi tutmondan aŭtoritaton. Ĉar ĝi volas rabi al la popoloj ilian estinton, ilian historion, ilian miton. Ĝi neas sentimenton. Sed nur sentimento esprimiĝas en la vorto »gepatra lingvo«. Ĝi estas la lingvo, per kiu ni estis de plej amata persono la unuan fojon tute komprenataj. Pri tio do temas! Laŭ tia ĉion ampleksanta potenco ni komprenas la piajn vortojn en la komenco de l' evangelio de Johano: »Komence estis la vorto, kaj la vorto estis ĉe Dio kaj Dio estis la vorto!«

Trad. d-ro Sós

Gravaĵoj.

Friedrich Ellersiek G. m. b. H., Berlin SW 61, Wilms-Str. 6 transprenis de la firmo Rudolf Mosse, kiu likvidis la Esp.-sekcion, la tutan stokon da Esp.-verkoj kaj la gazetojn »Germana Esperantisto« kaj »Esperanto Praktiko«.

Do por Mosse destinitajn mendojn adresu al Ellersiek.

Foiro de Paris (11.—26. V.)

La ekspozicio de »Esperanto et Commerce«, 9 rue d'Armaillé, Paris (17e) troviĝas en la budoj n-roj 2734 kaj 2736. La esperantistoj vizitu ilin.

Supra Aŭstrujo kaj sia ĉefurbo Linz a. D. estas la surskribo sur la gvidfolio eldonata sub la aŭspicoj de UEA pere de l' Urba-Oficejo kaj la Landa Unuiĝo por Fremdultrafiko. Ĝi estas belaspekta kun du belaj bildoj sur bona papero, 4 paĝa, en la kutima formato. Eldonnombro 10.000. Mendebla de alilandanoj ĉe Landesverband f. Fremdenverkehr, Linz, Landhaus, Klosterstraße, kie oni ankaŭ parolas E., aŭ pere de la kom. del. Dir. Wanneck, Weissenwolfstraße 31, del-ino Sofie Çipera, Schubertstraße 42 aŭ vicdel. J. Mraz, Aubergstraße 43.

El **Radio-Genova** s-ano Jean Borel parolis la 20. IV. en E. pri »Progresoj de agrikulturo en Italujo.« Ni ĝojas, ke Radio-Genova aliĝis al la E.-disaŭdigantaj stacioj.

9. **Kongreso de SAT** (4.—10. aŭgusto) en Leipzig. Kotizo RM 2.—. Kongresafiŝoj po 10 ₰, folio de sigelmarkoj (60 pecoj) 50 ₰. Adr.: Kampfrad, Löbauerstr. 35, Leipzig N 24.

4. **Kongreso de Sveda Laborista Esperanto-Asocio** 6.—7. VII. en Örebro. Adreso: Sveda L. E.-A., Box 73, Göteborg.

7. **Kongreso de Intern. Vegetara Unio** en julio en Steinschönau, ČSR. Adr.: Redaktoro Feix, Warnsdorf VI. 1894, Ĉ. S. R.

Centra Dana Esper.-Ligo jarkunvenos 19.—20. V. en Holbäk. Adreso: C. D. E.-L., Kastanievej 32, Odensee.

Espero Katolika-Paris publikigis en sia maja n-ro bonegan artikolon pri IEMW »La Meko de la esp.-istoj« de P. Fr. Mestan.

Brighton, la reĝino de banurboj. Gvidfolio eld. de Corporation Publicity Dep., Royal Pavilion, Brighton. 4 pĝ.

Centra E.-Librejo, s-Gravensage. En la jara ĝenerala kunveno de akciuloj en Hago estas fiksita dividendo de $6^1/_2$% (lastjare 6%).

Aŭstria Esperanto-Asocio

Wien, I., Annagasse 5

Ŝtataj ekzamenoj pri Esp.

Dum la printempaj ekzamenoj 1929 (2.—4. aprilo) la ŝtata komisiono donis jenajn temojn:

A) Ekzameno pri instrukapableco: Traduko el »Pola Antologio« de Kabe (ombroj), stila tasko laŭ elekto: 1. E.-eminentuloj, 2. Kian signifon havas »la tago de libro« por la esp.-istoj? 3. Rezurekcio, ĝen. pedagogio: La kulturo de la solidarecsentoj en la edukado, lingva metodiko: La principo de intuicieco en la E.-instruado.

B) Ekzameno pri scio de E.: Traduko el »Fabiola« de Wiseman (ĉap. 2, filo de martiro), stila tasko laŭ elekto: 1. Komparo de l' invento de Zamenhof rilate la civilizacion. 2. La internacia sporto kaj la internacia lingvo. 3. Kion kaŭzis la nunjara vintro en la urbo kaj kamparo?

Estontaj kandidatoj trastudu: »D-ro Wollmann, Die Prüfungen für die Fremdsprachen.« S 3.10.

Graz: E.-Soc. p. Stirio: 17. 4. Estrarkunsido. La private proponita komuna propagando de ĉiuj Graz-aj E.-grupoj okaze de la novelektoj de la urbkonsilantaro ne povis esti farata, ĉar unu el la grupoj, katenita per politikaj dog-

moj, rifuzis kunlabori. — Landestro de Stirio prof. d-ro Rintelen akceptis eniri Intern. Kuratoran Komitaton de IEMW kaj Antaŭkongreso. En la nomo de IEMW la prez. kolonelo Hackl transdonis la invitleteron de IEMW.

Graz: Loka grupo: 4. 4. Monatkunveno (ekzercoj), 11. 4. prelego, 18. 4. Zamenhof-memorfesto, entuziasmiga parolado de prez. Hallamayer, prelegoj el tradukoj de l' Majstro, 25. 4. komuna legado kun tradukado el ĵurnalo ISK. Programo: 15. 5. Estrarkunsido, 16. 5., 6. 6. ekzercadoj, 23. 5. parolado, 13. 6. monatkunveno.

Graz: E.-Soc »E. Peltier«: 15. IV. Zamenhof-memorkunveno, en kiu vicprez. Dürschmied prelegis el »Privat, vivo de Zamenhof« kaj parolis pri la »interna ideo« kai la homaranismo de l' majstro. Okaze de »Tago de la E.-libro« k Ikaj membroj aliĝis al Eldonsocieto St. Michaelo.

Innsbruck: Klubo Esp.-: La 3. IV. parolis R. Ludwig pri »Naciismo, supernaciismo kaj internaciismo«. La 17. IV. okazis bonege vizitata Zamenhof-memorsoleno, kiun ĉeestis hon. membro prof. Egger-Hall kaj s-anoj el Brazilio, Rusujo kaj Bulgarujo. La memorparoladon faris prez. Kühbacher, Welkoff parolis pri »La devoj de la anoj«, f-ino Bederlunger (pianoforte), Langhammer (kantoj), Krieser (violono) akompanate de f-ino Schmidhuber kaj Niester, fine Englsdorfer kaj Silberstein (deklamoj) igis la feston tre amuziga. Ĝi tial daŭris ĝis meznokto. La lokaj gazetoj raportis pri ĝi.

Linz: Grupo de SAES: Ĉefkunsido 3. 5. Parolado de dir. Wannek pri sia siatempa restado en Brazilujo (lando kaj popolo).

I. E.-Unuiĝo en Wien: La parolado de prof. Dro V. O. Ludwig ne povis okazi, ĉar la prezentado de lumbildoj ĝis somero en la paroladsalonego estis malpermesata de la polico. — La 17. V. okazos en la klubejo I. Annag. 5 je la $^1/_2$8 h prezentado de fonografaj diskoj kun la I-a Kongresparolado kaj paroladoj de d-ro Privat. Senpaga eniro, 24. V. Dro V. Matejka: »Militeblecoj estontaj«, 7. VI. min.-kons. Viktor Hawlik: »La ideala ŝtato.«

Venu multnombre!

La 12. 4. okazis parolado de verkisto doktoro Kurt Frieberger, sekcia kons. en la kancelierejo, pri »La spirito de la lingvo«. Ĉeestis pli ol 50 neesperantistoj el la konatularo de l' parolanto, inter ili sekcia ĉefo d-ro Uebelhör el kancelierejo, sekcia ĉefo d-ro v. Trentini, prezidanto de Kulturbund, min. kons. d-ro Simons el Berlin, grafino Sizzo-Noris, prof. de Technische Hochschule kort. kons. d-ro d-ro Schumann, min. kons. R. Chavanne kaj d-ro Ewald Mayer, kort. kons. Ehrenstein kaj d-ro Wollmann, prof. doktoro Eugen Guido Lammer ktp.

Wien: E.-grupo »Verda Stelo«: Jarkunveno la 6. 4. La grupo jam ekzistas de 1912. Nova estraro: L. Huber-estro, Michl Danzböckgruber — s. kr., F. Bendlkas. Ni deziras daŭrigan evoluon!

Zamenhoffeston kune aranĝis Katol. Unuiĝo Esp. kaj E.-grupoj »Verda Stelo« kaj »Gajeco« la 13. 4. en la salonego de Katolika Subinajstra Unuiĝo. Ĉeestis kiel gasto la prez. de Itala E.-Katolika Ligo P. Modesto Carolfi el Roma. La soleno komencis per diservo en la instituta kapelo, parolis s-roj Huber, P. Kudrnovsky, Schiebl kaj Chiba, fine prof. Carolfi kaj P. Schneider kiel domestro. La feston plibeligis deklamo de f-ino Zopperitsch kaj kantoj de f-ino Wernert akompanate sur la fortepiano de s-ro Chiba.

Wien: E.-Org. de Oficbavantoj de Urbo Wien: En la ĝeneralkunveno de l' 27. 2. estis elektataj: lern. dir. Struska-prez., instr. Spitzer, lern. insp. Stengel, lern. dir. Spinka-vicprez., tekn. ofic. Bernfeld, ofic. Igo Sperling, of.-ino Ondryas-sekr., lernejestro Menacher, of.-ino Zich, instr. Kassal-kas., fakinstr. Drössler, lernejdir. Feder, kalkulkons. Frey, instr. Kraus, ferv.-insp. Kutter, lern. kons. Peter, ŝtata ofic. Werner-konsilantoj. Ni deziras plej bonan sukceson de la laboroj de la nova estraro.

Ni korektas eraron: Ne la ĝeneralkunveno sed la novelektita estraro decidis en sia unua kunsido la nealiĝon al AEA kaj AED.

5. 4. okazis lumbildpar. »Dalmacia vojaĝo de Split ĝis Rab« (par. instr. Spitzer), 13. 4. vizito de Katakomboj kaj Stefansturm (45 partopr.), 19. 4. lumbildparol. »Vojaĝo tra Salzkammergut« (par. prez. dir. Struska), 12. kaj 26. 4. pri »E.-stenografio«. Ĝeneralaj principoj kaj skizo de propra sistemo (par. E. Werner), 8. 5. vizito al la fabriko de elektraj lampoj Kremenetzky, 11. 5. vizito de la operdomo kaj ĝia scenejo, 15. 5. lumbildpar. »Egiptujo« (par. Kraus). Ĉiujn vizitojn gvidis Bernfeld. — La 10. 6. je la 8. v. okazos vizito al Urania-Sternwarte. Renkontejo: Turenirejo.

Wien: E.-rondo en Calasantinum aranĝis grandan festprezentadon la 28. 4. en Immakulata-salonego de Calasantinum. La festparoladon faris P. Kudrnovsky, vicprez. de AKLE, lumbildparoladon A. Silhan, la muzikprezentadon la orkestro de Calasantinum. Multaj gastoj ĉeestis. Pro la bona sukceso ni danku al frato Villanova, estro de la rondo.

Solvo de l' ciferenigmo:

Antwerpen, Montblanc, Stirio, Gogol, mardo:

Esperanto estas ne sole lingvo, sed grava socia problemo.

Bonajn solvojn alsendis: R. J. Schaur sen.-Eisenerz, Margarete Tröger-Falkenstein i. Vogtl., J. Laschat, Christine Ott-Graz, J. Pich-Kaltenleutgeben, J. Kollowein-Kohlnhof, Sofie Cipera-Linz, A. Troszynski-Pelplin (Polujo), J. Wiesböck-Puch, J. Pollhammer-Salzburg, Anna Bayhofer, H. Huber, L. Linner, W. Michel, C. Mlecus, W. Mudrak, J. Siml, G. Weber, L. Widhalm, Maria Zemann ĉiuj Wien, S. M. Amando Konrad-Eggenberg, K. Dürschmid-Graz.

Libropremiojn gajnis s-roj Michel, Schaur sen. kaj Troszynski.

Rimarkindaj presaĵoj.

Heroldo de Esperanto - Köln.

Ilustrita Biblioteko. Dua serio. N-oj 6—10. Kun bildoj de Georg Zimmer kaj Jacinto Comella. Tuta serio Mk. 2.— Unuopaj n-oj Mk. —.50. Ĉi tiu dua serio kompilas diversajn rakontojn sub la komuna titolo »La Maro« kaj entenas same kiel la unua interesajn kaj legindajn rakontojn kaj skizojn en bonega E.-stilo parte tradukitajn, parte originalajn. En la teksto troviĝantaj novaj, ĉefe en la marista terminaro uzataj vortoj estas en la broŝuroj aparte indikataj kun klarigoj.

La ŝipĉarpentisto de Gerstäcker (el germana lingvo trad. Egruho) estas tre interesa rakonto pri la sorto de marista metiisto Tom Burton, karakteriza por la moroj en la angla ŝipistaro. (N-o 6/7.)

N-o 8 sub titolo el »Navigado estas necesa« entenas ĉapitron el la samtitola romano de Fock, kaj du aliajn rakontetojn: Kaprico, originale en Esperanto de Boatman, kaj Agonio de la »Semillante« de Daudet (el franca trad. Fiŝer).

N-o 9 estas rakonto de Teo Jung en prozo laŭ la mezepoka germana eposo »Gudrun«, pritraktanta krom aliaj legendaj okazintaĵoj la romanon de la samnoma ĉarma kaj fidela juna reĝidino kaj ŝia amikino Hildburgis.

La hantataj ŝipoj de Cunningham kaj Ŝuldpedelo sur la maro de Russel (el angla tradukitaj de Newell kaj Sturmer) prezentas tipajn marrakontojn el la brita ŝipistaro, (pri iliaj moroj, superstiĉoj kaj humoro.)

Ĉiuj belaspektaj libretoj estas tre rekomendindaj kaj pro ilia malalta prezo certe de ĉiu facile akireblaj. Sós.

Supera kurso de Esperanto

de Dr. Leopold Dreher, kun antaŭvorto de prof. Th. Cart. — Inter la granda nombro de lernolibroj certe ĉi tiu 68 paĝa libreto meritas estis nomata kiel unu el la plej bonaj. En dek lecionoj estas kompilitaj bonege elektitaj tekstoj por legado kaj pliperfektiĝo per postsekvantaj ekzaktaj gramatikaj klarigoj kaj indikoj al perfekta uzo de vortelementoj. Post ĉiu leciono troviĝas ankaŭ en formo de »Demandaro«, »Rakontado« kaj »Lingva tasko« reguloj por ekzercado, ĉu sub gvido de instruantoj ĉu por memlernantoj.

Tre atentinda estas (p. 35), ke: la vorteton »des« oni uzas nur akompanata de »ju«, ĉar en gazetoj kaj verkoj ofte troviĝas la formo »des pli« anstataŭ »tiom pli«.

Ni trovas en la libro (p. 64): »Ne jam = ankoraŭ ne« (D-ro Zamenhof rekomendis »ankoraŭ ne«.) Laŭ sintakso de Esp., permesanta liberan vortordon, estas »ne jam« = »jam ne« ne samsignifa al »ankoraŭ ne«, tial en lasta senco ne aprobinda. (»Ne jam« por »ankoraŭ ne« kaj »des pli« por »tiom pli« estas laŭ mia opinio lingvaj maldecaĵoj.)

Per la regulo (p .17): »Tasko farota« signifas ne nur: tasko, kiun oni faros, sed ankaŭ: tasko, kiun oni **devas** fari. Kiam oni volas akcenti tiun kromsignifon de -ota, oni povas diri: tasko far**enda**, — la aŭtoro aprobas la uzon de la sufikso »end« (gerundio), kiun nia Akademio espereble baldaŭ oficialigos.

Mi finas mian recenzon pri la libreto per vortoj de nia altŝatata samideano prof. Cart (el la antaŭvorto), kiuj certe taŭgas por interesigi progresemulojn pri ĉi tiu laŭdinda verko, kies aĉetadon ni varme rekomendas. »Ju pli ni ĝin uzas kaj studas, des pli ni konstatas, ke ĝi plene meritas la admiron kaj plan respekton, kiun'ni, kaj vi kara kolego, inter ni, konservas al la lingvo, al ni donacita de nia kara Zamenhof en sia Fundamento.« D-ro Sós.

C. K. de SEU, Moskva, Spiridonovka 15:

Rublev S.: Esperanto-Rondeto, praktika helpilo por grupa studo de E., parto I., por rondetanoj, 3-a eld. (17.—31. miloj), 1929. Prezo 50 kop., 60 pĝ., 17:26 cm.

Enhavas la tutan gramatikon, montrita al la rondetano en formo de tre interesaj legaĵoj, kiuj pritraktas ankaŭ la organizon de SEU, SAT, Kongresoj ktp. Bona Esperanto. Malmultaj preseraroj. En la tabelo mankas ĉia, ia, nenia, tiom, ktp. La finaĵoj de la landnomoj en tab. XIII. certe ne plaĉus al Lingva Komitato, ankaŭ al mi ili ne plaĉis.

Stalin J.: Pri Lenin. El la libro »Pri Lenin kaj Leninismo«, trad. P. Tilin-Leningrad kaj kontrolita laŭ komisio de Lingva Komitato ĉe SEU de N. Hohlov-Moskva. 1929. 23 pĝ. prezo 15 kop.

Bonega traduko, bonega stilo, ilin ja kontrolis Hohlov. Bedaŭre ni nur ricevis la tradukon de l' aldono al la ege leginda verko de Stalin. Ni esperu, ke SEU traduku la tutan verkon!

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Schönaugasse 6/II, Vereinsheim (kunv.) »Pastete«, Sporg. 28, Do (ĵ) 20—23 h.

Leoben.

Esp.-Verein für Steiermark: Cafe Weidbacher, Mittwoch (me) 20—22 h.

Innsbruck.

Esperanto-Klub, Gasthof »Grüner Baum«, Museumstraße. Mi (me) 20—22 h.



Wien.

Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Schottenhof (Akademikerheim) Mi (me) 18·00—20·00 h.

Esp.-Unuiĝo-Wien, I., Annagasse 5, I-a et., klubejoj de »Politische Gesellschaft«, Fr. (v.) 19·30 h.

Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, IV., Schäffergasse 3, Mi (me) de 19 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17—19 h.

Viena Akademia Unuiĝo Esp., VII., Neubaugasse 25, Cafe Elsahof, Mo (l) 19—23 h.

Esp.-societo »Fideleco«, Währinger Bürgercafe, XVIII., Staudgasse 1, Di (m) 16—19 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Franz Reifmüller, Wien, I, Johannesgasse 6